

EKO 2024

TRA LA
MONDO
IRAS FORTA
VOKO

Numero 2024:15 aprilo 10.

Pezo: Word 40, PDF 220 KB, Alkroĉaĵo Irano. 18 KB, Sume 280 KB

Aruŝa Dua Bulteno kaj kreskantaj aliĝoj

Aperis la Dua Bulteno por la Kongreso en Aruŝo. Ĝi proponas eblojn mendi enloĝigon, ekskursojn kaj multon plian. Kreskas la nombro de aliĝintoj (je la 10-a de aprilo): Jam aliĝis 432 homoj el 55 landoj al la 109-a Universala Kongreso de Esperanto:

Germanio 46, Francio 40, Italio 30, Korea Resp. 26, Ĉinio 26, Japanio 20, Usono 19, Belgio 17, Pollando 17, Brazilo 16, Tanzanio 15, kaj Britio 13.

Esperantistoj kaj EKOSOK en Kenjo

UEA estas ligita kun Unuiĝintaj Nacioj per du vojoj. La ĉefa estas EKOSOK, la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN. EKOSOK estas la vojo kiun UN uzas por rekoni, registri kaj interrilatigi neregistarajn organizojn. Ĝiaj komunikaj vojoj estas dudirektaj: ĝi havas la taskon engaĝi neregistarajn organizojn (NRO-oj) kaj ĝi ankaŭ rolas kiel mekanismo por ebligi komunikadon de NROj al UN.


La dua estas UNDCG, la Departemento por Tutmonda Komunikado. UNDCG komuniĝas kun la gazetaro, disvastigas informojn pri UN, k.s. Ĝi kunlaboras kun NROj, kaj organiza komitato de NRO-oj gvidas tiun parton de ĝia laboro, kiu do estas ĉefe unudirekta: liveri informojn pri UN al la vasta publiko tutmonda pere de NRO-oj.

De tempo al tempo UNDCG organizas civilsociajn konferencojn por plani kaj superrigardi la rilatojn UNDCG/NRO-oj. Teorie, tiuj konferencoj okazas ĉiujare, sed la plej lasta okazis tuj antaŭ la pandemio, en Sallagurbo (Salt Lake City), Usono. UEA estis reprezentata de la prezidanto de UEA, Duncan Charters, kaj aliaj.

Ĉi-jare post kelk-jara paŭzo, oni denove kunvokas Civilsocian Konferencon, ĉi-foje en Najrobio la 9-an kaj 10-an de majo. Reprezentos UEA Mana Brinson, el Kongo DR, kaj Anny Joance, el Burundo. Informojn pri la konferenco vi trovos ĉe:

<https://www.un.org/civilsociety/2024UNCSC>

Mi kredas, ke vi povas regule ricevi la bultenojn de la komitato de NRO-oj kiuj kunlaboras kun UNDCG turnante vin al ties retejo: gnec.ngo.



Humphrey Tonkin



MuzikaKlub donas kanton pri Maceio

Ĉu vi scias, ke la 57-a Kongreso de ILEI okazos en Brazilo, en la urbo Maceio, de la 20-a ĝis la 27-a de julio? Do, jen kanto, kiu estas konata kiel preskaŭ himno de la kongresurbo. Ĝia originala titolo estas *Ponta de lápis*, kaj ĝin tradukis **Aristóphio Alves Filho** kaj **James Rezende Piton**. Vi trovos la vortojn en la sekva paĝo:

<https://www.brazilakolekto.com/2024/03/krajonpinto.html//ligo?>

Kursoj abundas

La redaktoro de edukado.net informas vin, ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Retkurso de Esperanto
Gvidantonomo: Enrica Tamani, aldoninto: Luigia
Loko: Parma, Italio.

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo <https://edukado.net/kursejo?kid=27631>

Nomo: Babilada Kurso
Gvidantonomo kaj aldoninto: ZHANG Wei
Loko: Dandong, Ĉinio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27638>

Nomo: Virtuala Esperanto-Kurso
Gvidantonomo kaj aldoninto: José Roberto Alves de Albuquerque
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Fortalezo, Brazilo.

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27637>

Nomo: Nova kurso
Gvidantonomo kaj aldoninto: Ruben Sanchez
Loko: Neuquen, Argentino

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27627>

Ĉinoj matematikas ŝake

Matematika Ŝako en Esperanto aperas en Ĉinio. Jen la mallonga novaĵo ĉe Jutubo:
<https://youtu.be/FKPqWHYZcVg?si=9AxwAKTNYclgigHX>

Ĝi tre taŭgas por infanoj (eĉ neesperantistaj). Per ĝi oni povas reklami nian lingvon. Komisiite de la inventinto, mi prezentos ĝin dum la 109-a UK, kaj serĉos kunlaborantojn en diversaj landoj. Kunlaborantoj senpage akiros ĝin dum la UK. Interesiĝantoj bonvolu kontakti min.

Trezoro Huang Yinbao, **Esperanto-Centro Jingchuan Ĉinio**
trezoro@qq.com Skype: huangyinbao,

Per komunikiloj de facila vento

<https://uea.facila.org/artikoloj/lingvo/balaibalano-la-444-jara%C4%9Da-pra-esperanto-r410/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/homoj/kiu-estis-doktoro-ignaz-semmelweis-r418/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/movado/oomoto-r420/>

Muziko el Madagaskaro

Nia monata podkasto ELSENDO N-ro140 proponas al vi novaĵojn de Malagasio. Ĝi traktas ankaŭ kulturon tra la vivhistorio de Esther Randriamamonjy, multefaceta kaj produktiva malagasa verkistino kaj tradukistino de rusaj kaj francaj verkaĵoj en la malagasan. Ne hezitu monhelpi nian retradion *Aminda Radio Esperanto*, se ĝiaj 140 podkasto plezurigas vin. <https://youtu.be/dYpJc5UT5qM>

Henriel FIDILALAO, Madagaskaro

Lernolibro de Stano Marček rete distribuita en Albanio

Tiu verko ne plu havas la financadon por aperi en presita formo, sed rete la enhavo estas je dispoŝo kaj en la manoj de la nelacigeblaj albanaj esperantistoj.

Favore al multlingva mondo

Kadre de bonega iniciato <https://www.coalitionforlanguagerights.org/>, en kiu oni utiligas inter deko da lingvoj ankaŭ Esperanton, i.a. jene, ekzemple:

‘La Koalicio agnoskas, ke la uzo de la angla kiel komunika lingvo estas limigo, kaj aktive laboras por ellabori efikan multlingvan komunikan strategion’, kaj do, oni anoncas la unuan ĉiujaran Premion por Defendantoj de Lingvaj Rajtoj. Ĉi tiu premio celas rekoni kaj honori individuojn, kiuj demonstras elstaran engaĝiĝon al lingvaj rajtoj. Kaj do, la unua premiito estas el Finnlando.

PRI NOMUMOTOJ: Proponoj povas esti faritaj en la angla, la svahila, la mandarena, la hispana aŭ la franca, kaj homoj povas nomumi sin aŭ aliajn. Nomumado por la Premio de Defendantoj de Lingvaj Rajtoj fermiĝas la 22-an de aprilo.

<https://www.languageonthemove.com/language-rights-defenders-award/> (Gerald Roche)

Plurcela kongreso

Tio okazos de la 17-a ĝis la 27-a de aŭgusto en Beogrado, Serbio. Temas pri la Internacia Esperanto-Kongreso, kie kunvenos blindaj esperantistoj, balkanaj esperantistoj, balkanaj ILEI-sekcioj kaj pliaj.

La eventon kunorganizas:

- Serbia Esperanto-Ligo (SEL) kun sia Instruista Sekcio
- Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE)
- La 88-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj
- IKK-seminario de SEL/UEA: Trejnseminario pri interkultura komunika kompetento, instrukapabligo kaj aktivula lertigo sub gvido de Duncan Charters, Francesco Maurelli, Sara Spanó kaj aliaj fakuloj



- Tagoj de ILEI: regiona renkontiĝo de instruistoj de Balkanio kaj Danubio
- Balkanaj tagoj: kunveno de esperantistoj el Balkanaj kaj najbaraj landoj
- Komuna arta, distra kaj ekskursiva programo

Ĉio estas alirebla per unu aliĝilo kaj ununura kotizo. Ĉiu aliĝinto rajtos partopreni ajnan programon laŭ propra elekto. Pluraj programoj neeviteble estos paralelaj. La trejnseminarioj finance subtenas: Erasmus+, UEA kaj ILEI. Stipendiojn ricevas 12 seminarianoj laŭ la [Stipendikonkurso](#). Vi povas konkursi per [Stipendipetilo](#). Legu pli pri la evento kaj aliĝu per [retaliĝilo](#)

Bonvenige salutas vin la Organiza Kongresa Komitato
(nedeljkaloza@icm.com, zarkovicjovan@icm.com)

La 11-a irana Eo-kongreso okazos en universitato

Sekve de la Eo-kursoj en la Universitato de Teherano kaj bonaj rilatoj, kiuj estiĝis inter ni kaj la Universitato, la ĉeesta parto de la 11-a Irana Esperanto-Kongreso (<https://www.espero.ir/eo/irek-11/>) en 2024 okazos en la Universitato fine de aprilo. Ni alkroĉas la plenan du-paĝan raporton pri la agado en 2023.

Ahmad Mamduhi, prezidanto de ILEI

Rigardu la kursan aktivecon en Liaoning

Jen 20-sekunda vidbenda novaĵo el Ĉinio: Liaoning-a Esperanto-Klubo malfermas la 9-an Kurson kun 60 lernantoj. Temas pri reta kurso trifoje semajne. En la filmo estas nur lokaj kursanoj, kiuj ĉeestas dimanĉan kurson. <https://youtu.be/WCGcyusnoDE>

Trezoro Huang Yinbao

===== vortoj: 1025 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

La unuaj dek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN: Skribu al stefan.macgill@gmail.com. Por forigok, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apertenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.